

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №5



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №5 (283)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Paweł Fischer-Kotowski, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 65-66.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №5 (283).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 мая 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo 5

Aleksander Korĵenkov. Ĉu vere “bona tendenco”?	6
Renato Corsetti. Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu: UEA kaj la movado ĉe vojkruciĝo	7

Eventoj 9

Irina Gonĉarova. La 6a Minska Lingva Festivalo: La Moskva skolo.	10
Irina Gonĉarova. Eterne juna Lingva Festivalo en Kalugo.	11
Vjaĉeslav Ivanov. Lingva Festivalo en Sankt-Peterburgo	13
Irina Gonĉarova. Festivalo en la ĉefurbo de Udmurtio	14
Mark Fettes. Trezoro Huang Yinbao – nova estrarano de UEA	15
La Estraro de UEA kunsidis en Roterdamo	16
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Kavaliro Rob Moerbeek!	18
Informi pri Esperanto en la festivalo Woodstock 2018.	18
Renato Corsetti. Ĉu kunlaboro inter civilizoj aŭ milito inter ili? Pri la 11a Mezorianta Kunveno en Marakeŝo	19
Sandor Horvath. Amikeco en Bekasi	21
Sabiyumva Jérémie. Plurnacia kongreso kaj AMO-seminario en Burundo.	22
Stefan Krieghoff, Brigitte Kranz. Printempa Semajno Internacia en fajrobrigada domo.	23
Michaela Stegmaier. Esperanto-tendumado en Herzberg.	24
Michele Guerriero. IJF 2018: Esperantumado en Kampanjo	26
Nazi Solat. Jam la kvina kongreso en Irano	28
Wu Guojiang. Liaoning: Por Esperanto en altlernejoj.	28
Tobiasz Kubisiowski. PEJ-semajnfino en Varsovio	29
Cyril Vergnaud. Ŝanĝi la mondon per vortoj	30
Paŭlo Sergio Viana. Sukcesaj BEL-Konferencoj 2018.	31
Paneveĵano. BET-55 preparata en Panevežys	32
Paŭlo Kozsuch. OSIEK kaj ĝiaj Internaciaj Esperanto-Konferencoj.	33
Tiina Oittinen. Somera kurso en la estonta kongresurbo	34
Forpasoj	35
Koncize (11 informoj)	36

Tribuno 37

Pri nomoj kaj homoj (Paul Desailly, Ian Fantom, Stella Lindblom, Fabiano Henrique, Ruth Keves-Cohen, Suso Moinhos)	38
--	----

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Dankon pro viaj proponoj!	39
Peter Baláž (Petro). Nova retejo por lerni la polan lingvon.....	40

Arkivo 42

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en majo 2018	43
Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (1).....	44

Kulturo 53

Povilas Jegorovas. Sukcesa prezentado de NDK en Vilno	54
Povilas Jegorovas. István Ertl en Litovio	55
Paŭlo Pavliček. Tri mondaj premieroj samtempe.....	56
Halina Gorecka. Ankoraŭ unu libro pri Eroŝenko (Recenzo: Татьяна Новикова, Татьяна Захарова. <i>Знаменитые земляки. Ерошенко</i>).....	57
Ricevitaj gazetoj	58
Flo! Brel en Esperanto	59

Mozaiko 60

Halina Gorecka. Barĉo, mirindaĵo de Orienta Eŭropo.....	61
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	64
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	65

En ĉi tiu numero vi legos pri kvar lingvaj festivaloj, okazintaj ĉi-aprile en Ruslando. En tri el la kvar festivaloj prezentis lingvojn aŭ prelegis pri ili Kuzma Smirnov, kies portreto laŭmerite estas sur la kovropaĝo. (Foto: Sergej Andrejsons)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Renato Corsetti: “Multaj ŝatantoj de statistikoj produktis longajn seriojn de numeraloj por klarigi, ke la membronombro de UEA falas kaj ke la nombro de paĝoj en Vikipedio kreskas. Ili certe faras utilan laboron, sed kiu ajn movadano konstatas sen statistikoj, ke UEA kaj la tradicia movado postlamas la evoluon de la mondo” (vd. p. 7-8).

Ĉu vere “bona tendenco”?

Post la pasintjare anoncita falego de la nombro da individuaj membroj (IM) de UEA de 5501 (2015) al nur 4365 membroj (2016), la nombro da IM en 2017 modeste kreskis je 136, kaj do nun UEA havas 4501 individuajn membrojn – ekzakte je unu mil malpli ol antaŭ du jaroj. La revuo *Esperanto*, en kies maja numero aperis la resuma statistiko, nomis tion “bona tendenco”.

La eta kresko okazis ĉefe pro pli granda aliĝado al ĉi-jara UK, kompare kun tiuj en 2016 kaj 2017, sed la plej grava kategorio “Membro-Abonanto” plu malkreskas: de 1341 en 2016 ĝis 1258 en 2017, kaj la nombro de la “eksteraj” abonoj al la revuo *Esperanto* (abonoj de nemembroj de UEA) falis de 83 ĝis 69. La kresko mem okazis danke al la multiĝo de la malpli kostaj kotizoj “membro kun Jarlibro” kaj “membro kun Gvidlibro”.

Ĉar la nombro da aligitaj membroj (AM) iom malkreskis (kelkaj landaj asocioj ankoraŭ ne kotizis por 2017), la suma nombro preskaŭ ne ŝanĝiĝis kaj plu restas iom super 13 mil.

Vidu la evoluon de la membraro de UEA post la Jubilea Jaro 1987, kiam la plej granda esperantista asocio havis pli ol 40 mil membrojn.

Jaro	IM	AM	Sume	Jaro	IM	AM	Sume
1987	7291	36351	43642	2003	5714	11264	16978
1988	7203	35945	43148	2004	5854	12148	18002
1989	7355	32474	39829	2005	6107	12253	18360
1990	7645	25224	32869	2006	6066	11732	17798
1991	8071	19146	27217	2007	6011	11477	17488
1992	7783	18808	26591	2008	5702	12492	18194
1993	7272	16041	23313	2009	5713	12605	18318
1994	7018	14495	21513	2010	5288	10527	15815
1995	7237	13808	21045	2011	5321	10480	15801
1996	7284	13314	20598	2012	5046	10057	15103
1997	7113	13018	20131	2013	4903	10019	14922
1998	7360	12812	20172	2014	5027	9789	14816
1999	7074	12096	19170	2015	5501	9215	14716
2000	6583	12522	19105	2016	4365	8689	13054
2001	6428	14889	21317	2017	4501	8570	13071
2002	5713	10549	16262				

Cetere, laŭ la Strategia Plano de UEA, akceptita en 2013, la nombro da individuaj membroj devus ĉiujare kreski je 10%, kaj do nun ĝi devus superi 7000, kiom neniam estis atingita en la 21a jarcento.

Aleksander Korĵenkov

Ĉio ŝanĝiĝu por ke nenio ŝanĝiĝu: UEA kaj la movado ĉe vojkruciĝo

Multaj ŝatantoj de statistikoj produktis longajn seriojn de numeraloj por klarigi, ke la membronombro de UEA falas kaj ke la nombro de paĝoj en Vikipedio kreskas. Ili certe faras utilan laboron, sed kiu ajn movadano konstatas sen statistikoj, ke UEA kaj la tradicia movado postlumas la evoluon de la mondo. Tion oni simple vidas en la Esperanto-klubo de iu ajn granda urbo de Eŭropo (ekzemple, Londono aŭ Moskvo).

Tradicie, ĝis la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento oni normale estis varbita por kurso en sia urbeto, aŭ hazarde vidis kaj aĉetis lernolibron en sia librovendejo, lernis la lingvon, aliĝis al loka klubo, pere de ĝi kontaktis la landan asocion, kaj pere de la landa asocio kontaktis la internacian movadon. Tiu tuta procedo postulis kelkajn jarojn, dum kiuj firmiĝis la lojalecoj al la diversnivelaj tavoloj de la movado. Tiam, se oni volis resti parto de la movado, nepre oni bezonis la kluban bultenon, la landan revuon aŭ la revuon de UEA.

En la nuna mondo oni lernas ĉefe rete. Fenomenoj kiel Duolingo aŭ lernu.net pruvas tion. Iusence ili estas la moderna versio de la amasaj kursoj de Andreo Cseh. De la reta lernado oni transiras al la filmetoj en Jutubo kaj poste al skajpo kaj Fejsbuko kaj kompreneble oni faras tion tute senpage. La loka klubo, la landa asocio kaj UEA venas poste, se entute ili venas.

Se entute ili venas, ĉar la novaj lernintoj ne sentas iun ajn lojalecon al la strukturoj de la tradicia movado, kaj ili ankaŭ ne bezonas tiujn strukturojn. Por pruvi tion, mi interrompis la verkadon por pruvi, ke per la reto oni trovas ĉion. Mi entajpis “esperantistoj Ulan Bator” en serĉ-programo, kaj tuj mi trovis kelkajn informojn pri mongolaj esperantistoj, sen bezono pri la jarlibro. Se mi dediĉus iom pli da tempo, certe mi povus trovi eĉ la koloron de la okuloj de la sekretario de la loka ulanbatora klubo pere de la fako “bildoj” de Guglo.

Do, ne estas mirinde, ke UEA (kaj ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, grupoj, kluboj) havas konsiderindan penon trovi homojn, kiuj estas pretaj pagi aliĝkotizon por servoj, kiujn ili ne plu bezonas.

Restas unu servo, kiu malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj ankoraŭ altiras homojn, kaj tio estas la homaj kunvenoj kaj de la lokaj grupoj kaj de landaj asocioj kaj de UEA, la Universalaj Kongresoj. Malgraŭ ĉiuj teĥnikaj komunikiloj homoj ankoraŭ ŝatas rigardi aliajn homojn en la okuloj kaj rekte interparoli en Esperanto. Eĉ usonaj lernantoj de Duolingo iniciatas serĉi loĝantojn en la propra regiono por renkontiĝi. Bonŝance homoj ankoraŭ restas homaj.

Tamen, ĉu la tradiciaj strukturoj estas ankoraŭ utilaj? Pri ĉi tiu punkto la opinioj malsamas. Mi mem opinias, ke ili estas ankoraŭ necesaj. Monda asocio, kiu

reprezentu nin ĉe Unesko, ankoraŭ estas bezonata. Landaj asocioj, kiuj postulu leĝojn pri instruado de Esperanto en la landaj lernejoj kaj informu en sia lingvo, ankoraŭ estas bezonataj. Lokaj kluboj, kiuj kontaktu urbajn estrarojn kaj informu pri Esperanto en sia medio, ankoraŭ necesas.

Aliflanke por ke ili restu en la centro de la movado kaj kun la tradicia gvida rolo, alivorte por ke nenio ŝanĝiĝu en la strukturo de la movado, ili devas komplete re-noviĝi, ĉio devas ŝanĝiĝi.

Imponaj fizikaj sidejoj kaj oficejoj en multekostaj landoj fariĝas malpli kaj malpli bezonataj. Jam de jardekoj firmaoj migris al pli kosto-favoraj landoj kaj transportis tien siajn servojn. Se oni telefonas informpete al la propra banko en Britujo, plej ofte respondas barata telefonisto, kiu sidas ie en Barato. Oficistoj cedas sian lokon pli kaj pli al aŭtomatigitaj procedoj. Se oni ne kredas pri tio, oni demandu sindikatistojn, kial ili protestas pro perdo de laborlokoj en Francujo aŭ en similaj landoj.

Paperaj revuoj estas io de la pasinteco. Oni bezonas ilin por la generacio, kiu estas malaperanta, sed ne por la novaj generacioj. Mi konas kelkajn junajn intelektulojn, kiuj neniam aĉetis ĵurnalon dum sia tuta vivo, kaj mi mem estas postĉasata de gazetoj kiel *Le monde diplomatique* aŭ *The Economist*, kiuj daŭre proponas al mi kelkajn siajn artikolojn senpage en la reto en la espero, ke mi iam pretos pagi por la papera versio.

“Librojn legu la verkisto”, – diris fama poemo de Baghy. Fakte ankaŭ la publiko legu ilin sed prefere en elektronika legilo. Mi volas diri, ke la tradiciaj libroservoj estas ĉie en krizo, kiel enkrizas kaj fermiĝas la librobutoj de niaj urboj. Ni ne povas pretervivi la normalan mondon.

Do, se neni ŝerpo, krom la renkontiĝoj, altiras homojn, kion organizu la tradiciaj strukturoj? Al kio ili dediĉu sin? Unue ili dediĉu sin al sia moderniĝo laŭ la supraj rimarkoj. Ne temas pri io facila. Mi ne enŝiras la estraranojn de UEA kaj de la landaj asocioj, kiuj devas fari la decidojn kontraŭ maljunaj membroj, kiuj protestas, ĉar oni tro rapide transformiĝas, kaj kontraŭ junaj membroj, kiuj protestas, ĉar oni tro malrapide transformiĝas.

Poste ili dediĉu sin al la vera kaj sola kialo, por kiu la Esperanto-organizaĵoj ekzistas, al la daŭrigo de la tasko de Zamenhof, al la disvastigo de la ideo de internacia lingvo kiel ilo de frateco inter la popoloj kaj de paco.

Eble mi estas iom ekstrema, sed la Esperanto-movado rajtas ekzisti nur pro tiu unu sola ideo de Zamenhof, kaj danke al ĝi ni travivis ekstreme sangan jarcenton kaj rezistis persekutojn kaj militojn. La mondo bezonas, ke ni parolu pri ĝi ĉefe al tiuj, kiuj ne volas aŭskulti ĝin. Se ni ne faras tion, ni estas sensignifaj por la mondo.

Tamen por esti liberaj fari tion, ni devas transformi nin de asocioj por vartado de la nunaj parolantoj de Esperanto en tradicia maniero al asocioj de agadoj por Esperanto, de asocioj de membroj al asocioj de partoprenantoj en kaj financantoj de agadoj por plibonigi la mondon.

Renato Corsetti

Eventoj



La Lingvaj Festivaloj, organizataj de la Moskva Esperanto-Asocio MASI, enhavas ne nur lingvoprezentojn, prelegojn kaj lingvoklubojn, sed ankaŭ koncertojn. Ĉi-jare en la programo de la Lernea Lingva Festivalo en Kalugo antaŭ la ĉeestantoj prezentiĝis artistoj el la TV-programo “Voĉo: infanoj!” (Foto: Irina Gonĉarova)



Foto: Kuzma Smirnov

La 6a Minska Lingva Festivalo: La Moskva skolo

La 1an de aprilo en Minsko triumfe pasis la 6a Lingva Festivalo, la plej granda en la postsovetia teritorio. De jaro al jaro MinLF fortiĝas kaj disfloras. Jam pasintjare la Minska festivalo superis la Moskvon laŭ la kvanto de vizitantoj – tiu proksimiĝis al 1000. La 6a LF en Minsko kolektis pli ol 1500 homojn, ĉefe junajn, kaj prezentis kapturte bonkvalitan programon – el 80 proponoj en ses kvardekminutaj blokoj.

Inter la prezentantoj estis entuziasmaj lingvistoj kaj filologoj de la Belarusia ĉefurbo kaj aliurbanoj, ekzemple, el Sankt-Peterburgo. La nivelon de la raportoj multe influis la Moskva teamo, elektita de la krea direktoro de la festivalo Anton Somin – juna Moskva lingvisto kaj universitata instruisto. Li alvenigis stelojn – de maturaj lingvistoj, kiel Aleksandr Piperski kaj Boris Iomdin, ĝis talentaj gejunuloj de la komencaj studjaroj, inter kiuj brilegis la esperantisto Kuzma Smirnov, preleginta en ses blokoj el ses eblaj pri diversaj temoj, de la antikva greka ĝis lingvoj de Tolkien.

Ĉiuspecaj amaskomunikiloj trumpetis pri la festivalo. La etoso estis kutime festa kaj hejmeca... Unuvorte: ĉio, kiel dum moskvaj LF, eĉ iom pli bone, iugrade danke al pli favora loka situacio.

La Moskvaj LF-organizantoj rajtas ne nur ĝoji pri la sukcesego de la pli juna frato, sed ankaŭ fieri pri si mem. La Minska festivalo estas sukcesa, sendube, pro la Moskva skolo. MinLF estas plibonigita kopio de la MLF. Kaj ne hazarde: Anton Somin plurajn jarojn estas vicdirektoro de la Moskvaj festivaloj, la ĉefadministrantoj – moskvanino Nadeĵda Ĉajko kaj minskano Nikita Moniĉ – ambaŭ estis prezentantoj kaj organizantoj dum Moskvaj LF.

Kvankam en la organiza teamo de MinLF ne estas esperantistoj, ankaŭ en Minsko pri Esperanto oni ne forgesas. Hazarde preterpasante TV-filmistojn, intervjuantaj Antonon, ni aŭdis lin rakonti, ke la ideo de LF apartenas al esperantistoj. En artikolo de la gazeto *Literaturo kaj arto* ni legas, ke Zamenhof, samlandano de belarusoj(!), estas kreinto de Esperanto, la lingvo, kiu estos prezentita en la festivalo. En la butikoj mendeblas libro de Aleksandr Piperski “Конструирование языков:

ot esperanto do dотракийского”, kiu gajnis la prestiĝan premion “Просветитель” (“Kleriganto”) en la 2017 jaro. Kaj dum la Parado de la prezentantoj, certe, sonis Esperanto kaj invito al la lingva prezento – ĉar ne eblas ne scii la lingvon, sen kiu tiaj lingvaj festivaloj tute ne ekzistus.

Miaj prezentadoj de Esperanto pasis dum du lastaj blokoj: la 5a kaj la 6a, en salono por ne malpli ol 40 homoj, kaj ambaŭfoje liberaj sidlokoj mankis. En paŭzo venis al mi juna minskano-memlernanto kaj demandis, ĉu estas vere mi, kiu gvidas en jutubo la videaron “Esperanto: la unua kanalo”, kiun li spektas. Alia studento-aŭtodidakto interesiĝis pri nia nova Ret-Babilejo, li deziras nepre aliĝi... Ne vane ni laboras, ne vane!..

Paroli antaŭ publiko de la lingvaj festivaloj ĉiam estas granda plezuro, sed kiam la aŭskultantoj – junaj, aktivaj kaj scivolemaj – tiom multas, ĝi estas vera ĝuo. Tiel estis en Minsko. Kaj tiel denove estos kaj en nia kara Moskvo, kaj en nia frata Minsko. Kaj pri promocio de Esperanto sur ambaŭ spacoj ni povas esti certaj. Ja la MASla skolo!

Irina Gonĉarova

Eterne juna Lingva Festivalo en Kalugo

La 21an de aprilo en la malnova rusa urbo Kaluga (je trihora trajnveturado de Moskvo) okazis Lerneja Lingva Festivalo, organizata jam dum sep jaroj de la urba departemento pri edukado kaj de Moskva Esperanto-Asocio MASI. La festivalo en Kalugo estas destinita por lingvoŝatanta lernantaro el la urbaj mezlernejoj. Ĝi estas ido de la Moskva Lingva Festivalo, kiu kuraĝigis la urbajn klerigajn instituciojn okazigi la festivalon, garantiante sian nepran organizan kaj enhavan helpon. Tial ekde la unua Kaluga festivalo moskvanoj riĉigas la lokan programon per siaj kontribuoj, kaj la nomo de MEA MASI staras sur la frontpaĝo de la festivala programfolio kiel la dua organizanto.

Ĉi-jare estis rekorda kvanto da fluparolantaj esperantistoj en la 10-homa Moskva teamo. Venis la MASlanoj Pjotr Fedosov (prezento de Esperanto kaj prelego pri la rusa lingvo), Ivan Sarkisov (du ĝeneral-lingvistikaj prelegoj), Tatjana Mojnjakova (ludoj pri diverslingvaj proverboj) kaj Irina Gonĉarova (metiejo pri Esperanto-poŝtkruciĝo); el Sankt-Peterburgo venis eksMASlano Kuzma Smirnov (du prelegoj pri planlingvoj kaj unu pri mistraktoj de lingvoj). Kiel gasto kun ni venis Britta Loose-Vanjuŝkin, germanino, nun loĝanta en Moskvo.

Dum la malfermo Irina Gonĉarova salutis la festivalon nome de MEA MASI, substrekte la rolon de esperantistoj en la okazigo de lingvaj festivaloj, kaj la parado de la prezentantoj ebligis menciojn pri Esperantaj programeroj.

Dum la labora festivala programo – tri 40-minutaj blokoj po 15 programeroj en ĉiu – ambaŭ Esperantaj programeroj havis grandan sukceson ĉe la publiko. La 13-jara Petro Fedosov prezentis Esperanton en sia tipa akademia maniero.



Foto: Irina Gončarova

Irina Gončarova okazigis surskribadon de belaj bildkartoj, sendotaj al la membroj de Esperanto-poŝtkruciĝo. Trideko da lernejoj kaj unu plenaĝa sinjorino entuziasme kopiis de sur la tabulo la salutfrazon, samtempe ensorbante gramatikajn kaj leksikajn klarigojn. Ne eblas certi, ke la tridek surskribitaj kartoj estos ĝuste afrankitaj kaj enpoŝtkestigitaj, sed, certe, ĉiuj per natura praktika ago perceptis vastan geografion de Esperantujo kaj facilecon de skribado. Ĉiuj infanoj ricevis la unuan sperton mane surskribi poŝtkarton kaj aranĝi ĝin por sendo eksterlanden. Ĉiuj ricevis multajn pozitivajn emociojn dum la kuna agado, kaj kvar knabinoj post kelkaj tagoj eĉ registriĝis al la Esperanto-poŝtkruciĝo.

Post la labora parto ĝojigis la publikon koncerto. Kalugo famas pro bonegaj koncertoj de lokaj infanoj kaj gejunuloj. Ĉi-foje en la programo estis steloj de la TV-programo “Voĉo: infanoj!” En la fermo konklude parolis Irina Gončarova, kaj sonis senĉesaj dankoj dum la enmanigo de la dankfolioj al la programgvidantoj.

La lokaj gvidantoj persone kaj publike danke menciadis la helpon de la Moskva festivala teamo de MEA MASI, kiu tre multe faras por la Kaluga LF – ja el la 30 festivalaj programeroj 17 estis faritaj de la moskvanoj. Ni prezentis kvin lingvojn, naŭ lingvistikajn prelegojn kaj tri praktikadojn. Kompreneble, ni estas invitataj por la sekva jaro. Eblas certi, ke ĉiuj ĉeestantoj forportis kun si pozitivan impreson kaj pri la festivalo kaj pri la lingva fenomeno, uzata de moskvanoj por paroli, kiu nomiĝas Esperanto.

Irina Gončarova



Oni scivolas pri lingvoj (Foto: Sergej Andrejsons)

Lingva Festivalo en Sankt-Peterburgo

Grandiĝas la lingva festivalo en la “norda ĉefurbo” de Rusio. Anstataŭ la kutimaj 50 programoj dum la festivala tago, la 15an de aprilo, okazis pli ol 70. Krom prezentoj de 40 lingvoj okazis ankaŭ prelegoj pri lingvistiko kaj lingvoinstruado, metiejo pri kaligrafio, enkonduka prelego pri la ĉina go-ludo.

Esperanton prezentis la ĉeforganizanto de la festivalo, instruisto de Esperanto Vjaĉeslav Ivanov. Per analizo de kelkaj poeziaj fragmentoj, li prezentis la gramatikon de nia lingvo kaj aldonis informojn pri la historio kaj nuntempo de la Esperantomovado. Krom tio la lingvo estis menciita en la granda prelego de Kuzma Smirnov pri artefaritaj lingvoj. Esperantistoj havis la eblecon interparoli dum la paroliga klubo de Esperanto, kiun gvidis Miĥail Kolodin. Profesiajn fotojn dum la festivalo faris alia esperantista aktivulo – Sergej Andrejsons.

Grandan intereson de la partoprenantoj vekis prelego “Lingvoj de judaj epitafoj” de Motl Gordon, kiu partoprenis esploradon de tombejoj en orienteŭropaj landoj. Konata pro sia agado por popularigi la jidan lingvon, Motl faris ankaŭ apartan prezenton de la jida. Grandan aŭskultantaron kolektis ankaŭ prezentoj de la finna (krom la ŝtata lingvo de Finnlando estis aparte prezentita la finna de la Peterburga regiono kun ĝiaj specifaĵoj), ĉina, malnovslava kaj la rusa gestolingvo.

La festivalo estas nekomerca kaj kostas nenion por la partoprenantoj, do ĉirkaŭ 600 personoj venis al la Sankt-Peterburga esplora universitato pri informaj teknologioj, mekaniko kaj optiko. Dank’ al malavara anonima subtenanto, ĉiuj prelegantoj ricevis riĉajn libropremiojn. La lingva festivalo en Sankt-Peterburgo okazis jam la dek-duan fojon. Lokaj esperantistoj organizas ĝin nome de REU.

Vjaĉeslav Ivanov



Anastasija Pivovarova kaj Anna Kadrova (Foto: Valerija Titova)

Festivalo en la ĉefurbo de Udmurtio

La 21an de aprilo en la Internacia Orient-Eŭropa universitato de Iĵevsk, la ĉefurbo de Udmurtio, okazis la kvara Lingva Festivalo, subtenata de MEA MASI. Pro la koincido de la datoj de la Iĵevska kaj Kaluga festivaloj la moskvanoj ne venis al la festivalo en Udmurtio, tamen dum la preparado la organizantoj multe konsultis min.

En 2017 ni oficvojaĝis al la 12a Moskva Lingva Festivalo du studentinojn de Udmurta Ŝtata Universitato, kondiĉe ke ili ne nur prezentos la udmurtan lingvon, sed ankaŭ iĝos kunorganizantoj de la sekva Iĵevska festivalo. Anna Kadrova kaj Anastasija Pivovarova plenumis la promeson kaj sub gvido de kulturologo kaj lingva aktivulo Aleksej Ŝklajev formis la organizan teamon de la kvara Iĵevska Lingva Festivalo.

La festivalo imitis nian klasikan formaton, ĝi konsistis el kvin 45-minutaj blokoj kaj prezentis 20 lingvojn kaj ok prelegojn. Tri programeroj estis dediĉitaj al la udmurta lingvo. Dum la preparado de la festivalo ni zorgis, ke estu prezentita ankaŭ Esperanto. Pri nia lingvo dufoje rakontis la juna Iĵevska esperantisto Roman Mutin. Antaŭ la festivalo Aleksej Ŝklajev petis min sonregistri salutvortojn por la malfermo. Krom la kutimaj klarigoj pri rolo de Esperanto kaj esperantistoj en la historio de lingvaj festivaloj, mi emfazis la gravecon de la atento al la udmurta lingvo.

Irina Gonĉarova

Trezoro Huang Yinbao – nova estrarano de UEA

La 21an de aprilo la prezidanto de UEA Mark Fettes informis pri la rezulto de la reta voĉdonado en la komitato de UEA pri elekto de du pliaj estraranoj de UEA. Ĉi-sube estas lia informo.

Finiĝis la voĉdono pri elekto de du pliaj estraranoj. Partoprenis 46 komitatanoj el 62, do la voĉdono estis kvoruma. Por elekto necesis ricevi almenaŭ duonon de la eblaj voĉoj, do 23. 8 komitatanoj voĉdonis sindetene (ili voĉdonis por neniuj kandidato).



La kandidatoj ricevis jenajn voĉojn:

Trezoro – 25
Orlando Raola – 22
Amri Wandel – 10
Barbara Pietrzak – 5
Bruĉjo Kasini – 2 ĝis 14*

* Mi metis steleton ĉe la rezulto ĉe Bruĉjo, ĉar dum la voĉdonado nia teknika helpanto Paul Helly konstatis problemon specife pri la registrado de voĉoj por li (la sistemo ne kalkulis ilin). Paul korektis la problemon, sed ni frontis eblan bezonon denove malvalidigi la voĉdonon, ĉar ni ne scias, kiom da voĉoj Bruĉjo ricevis antaŭ la korekto. Tamen la finaj rezultoj montras, ke tiuj voĉoj ne povus esti sufiĉaj por elekti lin. 38 komitatanoj voĉdonis por almenaŭ unu kandidato, do la suma nombro de eblaj voĉoj estas 76. Ni havas certecon pri 64 el tiuj voĉoj, do restas 12, kiuj estis aŭ voĉoj por Bruĉjo (antaŭ la korekto) aŭ voĉoj por neniuj (se la koncerna komitatano uzis nur unu el siaj du voĉoj). La maksimumaj voĉoj por Bruĉjo estus do 14.

Ni havas klaran rezulton. Nur unu kandidato ricevis pli ol duonon de la esprimitaj voĉoj, nome Trezoro, kiu fariĝas do la 7a estrarano. Mi gratulas kaj bonvenigas lin!

Mi krome esprimas elkoran dankon al la aliaj kvar kandidatoj – kaj kondolencojn al Orlando, kiu maltrafis la sojlon por elekto per nur unu voĉo! Ni esploras kun li la eblojn de pli proksima kunlaboro sur la kampoj, kiuj interesas lin.

Ĉi-sube mi donas la liston de voĉdonintoj. Dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis!

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Okaze de la Holokaŭsta tago la 12an de aprilo oni metis florkronojn en la Jerusalema memorejo Yad Vashem; inter la multaj florkronoj de ŝtataj instancoj kaj diversaj organiz-aĵoj, same kiel ĉiujare, estis la florkrono de ELI kaj UEA. (Amri Wandel)

Grupo da Vilnaj esperantistoj (Mindaugas Žuromskas, Vytautas Lukoševičius, Asta Baradinskaitė, Jūratė Baranova, Saulius Keras, Gediminas Degėsys) donacis al 900 bibliotekoj, precipe en etaj urboj kaj vilaĝoj de Litovio, almenaŭ unu lernolibron de Eo; sed ankoraŭ ne ĉiuj bibliotekoj ricevis tian donacon. (Gediminas Degėsys)

Alvenis al la librejoj la unuaj ekzempleroj de la hispana traduko de la origine Ea *Poemo de Utnoa* sub la titolo *Utnoa. Poema épico* de Abel Montagut, konata verkisto en Eo kaj la kataluna lingvo, kaj tradukisto de katalunaj verkoj. (La Bitbulteno)

Estis plena la salono en la publika biblioteko de Bledo (Slovenio) okaze de la prezento de la dulingva eldono de la romano *La sonorilo de Bled* verkita originale en Eo de Stefan Živanović kaj tradukita de Milan Jarnović, kiu rakontis pri la romano, sekvita de raporto de Vinko Ošlak kaj Giorgio Silfer. (HeKo)

La 30an de marto ene de sia serio pri elstaraj virinoj kiuj lasis sian spuron en la historio, la hispana ĵurnalo *Diario de Teruel* publikigis artikolon pri Lidja Zamenhof, verkita de Blanca Villarroja. (La Bitbulteno)

La Turka PEN lanĉis tradukoĉenon por la pacifisma poemo *Kiz çocuğu* de Nazim Hikmet verkita en 1956; inter la unuaj lingvoj enviciĝis Eo per traduko de prof. Silfer. (HeKo)

Laŭ la finkalkulo de la 101a UK, okazinta en 2016 en Nitra (Slovakio), la kongreso alportis netan gajnon de 29 mil 375 eŭroj, kiuj estas dividitaj inter la landaj organizintoj, Kongresa Rezerva Fondajo kaj Propaganda Kaso de UEA. (Martin Schäffer)

Komisiono de UEA pri Azia-Oceania E-Movado (KAEM) decidis okazigi la 9an Azian (kaj Oceanian) Kongreson de Eo la 25-28an de aprilo 2019 en Danang (Vjetnamio) kun la ĉeftemo "Esperanto kaj Kultura Diverseco de Azio kaj Oceanio". (El Popola Ĉinio)

La 21an de aprilo dum la jarkunveno de Pola E-Junularo en Lublino estis elektita nova Estraro de PEJ por la oficperiodo 2018-19: Tomasz Szymula – prezidanto, Romualda Jeziorowska – vicprezidanto, Tobiasz Kubisiowski – sekretario, Piotr Hołda – kasisto. (pej.pl)

Perla Martinelli estas elektita kiel la oka prezidanto de Kultura Centro E-ista (Ĉaŭdefono, Svislando) por trijara periodo; samtempe ŝi forlasis la prezidon de la Kooperativo de Literatura Foiro, kiun ekde nun prezidas Marie-France Conde Rey. (HeKo)

Je 30 apr 2018 al la 103a UK de Eo en Lisbono aliĝis 1370 e-istoj el 72 landoj; plejmulte el Francio 230, Brazilo 114, Germanio 110, Japanio 87, Pollando 73, Hispanio 65, Koreio 48, Belgio 42, Italio 39, Usono 36, Nederlando 34, Britio 33, Litovio 31, Portugalio 31, Ruslando 31. (uea.org).

Tribuno



Post la realigo de la lingvoinstruaj projektoj pri la slovaka, germana, ĉeĥa kaj rusa lingvoj, la krea grupo E@I nun partoprenas en la ellaboro de retejo por lerni la polan lingvon. Sur la supra foto estas la internacia teamo de la projekto dum ia lasta kunsido en aprilo 2018 en Ostrava.

Pri nomoj kaj homoj

La artikolo *NDK sub lupeo* de la kunaŭtoroj de *Nia diligenta kolegaro*, aperinta en la marta *Ondo* kaj publikigita ankaŭ en la novaĵretejo La Balta Ondo, kaŭzis diskuton en ĉi tiu novaĵretejo, precipe pri la unua ĉapitro *Ducent nomoj* de la artikolo. Ĉi-sube ni aperigas kelkajn komentojn.

La infanoj de Klara kaj d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof ĉiuj estis esperantistoj, sed miatakse Lidia plej elstaras ĉar ŝi estis ne nur ĉampiona instruisto de la Internacia Lingvo en du kontinentoj, sed ankaŭ mem modelstila aŭtoro kaj altnivela tradukisto. Ekzemple, oni diras tra jardekoj, ke ŝia esperantigo de “Quo Vadis” kiun verkis Nobel-premiito Herni Sienkiewicz superas eĉ la multekostan angligon de tiu klasika verko.

Dubinda listo. Ĝi ja enhavas iujn gravajn pionirojn kaj kolegojn en la movado, sed “nia diligenta kolegaro” ne signifas nuraj homoj kiuj parolis la lingvon, sed homoj kiuj kontribuis al la movado.

Kiel do oni povas pravigi la inkludon de Louis de Beaufront kaj Giorgio Silfer, kiuj rekte kontraŭlaboris la movadon? Sur kiu bazo oni inkluzivas John Wells, kiu kiel Prezidanto de UEA insistis, ke la sola rolo de la movado devas esti teni la lingvon en bona ordo, sen kampanji por ĝi, kaj kiu poste insistis la saman aferon kiel Prezidanto de sia landa asocio? Sur kiu bazo oni inkluzivas Humphrey Tonkin, kiu gvidis La Puĉon kontraŭ Ivo Lapenna en 1974, pro kiu “pardonpetis en la nomo de UEA” John Wells en Tampere, 1995? Pli specife, li pardonpetis pro la “mensogoj kaj kalumnioj” pri kiuj Ivo Lapenna daŭre plendis, kaj kiuj rezultis el lia demisio kaj la transpreno fare de Humphrey Tonkin. Sur kiu bazo oni inkluzivas homojn kiuj nomas siajn kontraŭulojn “paranojaj”, kiel Wells faris pri Lapenna, kaj Wells kaj Tonkin faris al mi.

Kaj sur kiu bazo oni entute ignoras la plej faman Esperantiston de la frua epoko en la Brita Imperio, kiu kontribuis pli ol iu ajn alia al varbado de Esperantistoj kaj ĝenerala akceptigo de Esperanto en tiu periodo, kaj kiu estis ĉiutaga nomo en la lando, kaj kiu havis eĉ monumenton sur la riverbordo de Tamizo en honora loko apud militmonumento ekster la stacidomo Temple? Se vi eĉ ne scias pri kiu temas, tio estas ĉar lia nomo estis forviŝita el la historio de John Wells kaj lia koterio en la Esperanto-movado, kaj de la koterio de Cecil Rhodes ekstere de la Esperanto-movado, kaj ĉar li estas konstante ellasita el listoj kiaj tiu ĉi.

Same kiel Ian Fantom, mi iom miras kaj dubas. Estas malfacile fari tian liston, ĉar neniam estas evidente kiuj estu en ĝi. Al la informa retejo “Ĉio pri esperanto” mi dum longa tempo volis fari liston de famuloj kiuj aŭ mem parolis aŭ almenaŭ iel subtenis la ideon de Esperanto. Ĝuste pro la problemo limigi kaj decidi ni ankoraŭ ne kreis tian liston.

**NIA
DILIGENTA
KOLEGARO**

HALINA
GORECKA
ALEKSANDER
KORJENKOV



Paul Desailly

Ian Fantom

Mi ankaŭ dubas pri Gbeglo Koffi, kiu ŝajne kontraŭas ĉiun alian, kreante sian propran Afrikan kongreson kvankam aliaj jam prilaboris ĝin lastjare, ktp. En tia lumo mi miras ke, ekzemple, mia patro ne estas en la listo, sed ankaŭ Harry Harrison. Se la listo nur celas montri “famulojn” malgraŭ ilia efektiva agado, do en ordo, sed se temas pri aguloj estas probleme, ĉar multaj laboregas en silento. Specife virinoj pli ofte strebas kaj faras la nevideblajn aferojn kiuj tamen estas bazo sur kiu aliaj staras.

Stella Lindblom

Mi gratulas la eldonistojn. Tamen mi konstatis, ke bedaŭrinde mankis la nomoj de Sylla Chaves, Carlos Domingues, Geraldo Mattos kaj Alberto Couto Fernandes. Ankaŭ menciindas, ke mankis la nomoj de gravaj brazilaj esperantistoj, kiel Braz Cosenza, Cedilha Neto, Diderot de Freitas, Fernando Marinho, João Batista Mello e Souza kaj Everardo Backhauser (forpasintaj); kaj Jorge das Neves, Jair Salles, Givanildo Ramos Costa, Affonso Soares, Benedicto Silva, Aloísio Sartorato kaj Paulo Sergio Viana (vivantaj).

Krome ne eblas forgesi nomojn, kiel Luiz da Costa Porto Carreiro Neto, Allan Kardec Affonso Costa, Leopoldo Knoedt, Joel Manso, Evaldo Pauli, Wilson Veado, Othon Baena, Mario Ritter Nunes, Balbina de Moraes ktp.

Fabiano Henrique

Ŝajnas al mi, ke Anna Lowenstein, Lidja Zamenhof, kaj Bertilo Wennergren estu en tia listo. Ankaŭ Paul Gubbins meritas aperi en listo de eminentuloj en Esperantujo.

Ruth Ke vess-Cohen

Gratulon pri la verko, kiu certe malkovros multajn nekonatajn nomojn al la legantoj. Tiaspecaj listoj neniam povas esti plene kontentigaj por ĉiuj. Mi konsentas kun Ruth, Paul kaj Alina pri la nomoj, kiujn ili proponas. Verdire mankas virinoj. El la brazilaj anoj proponitaj de Fabiano, eventuale Chaves, Mattos kaj Knoedt mi akceptus, kvankam mi agnoskas, ke mi sekvas literaturan kriterion. Sed vi jam ekpensis pri venonta, pli vasta listo por la dua eldono, do certe sukcesos plikolorigi la kalejdoskopon.

Suso Moinhos

Dankon pro viaj proponoj!

Estas tute nature, ke oni volas, ke en la enciklopedio aperu pli da oniaj samlandanoj, samnacioj, samseksanoj kaj sammetianoj. Sed, kiel dirite en la antaŭparolo, “La ĉefa kriterio estis kaj restis nur la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, sendepende de ties nacia kaj seksa apartenoj. Pro tio en NDK plej multas eŭropaj viroj, kiuj dum la unua jarcento de Esperanto disvastigis la lingvon kaj riĉigis ties aplikadon en diversaj sferoj de la homa vivo”.

Ni zorge registras ĉiujn ricevatajn proponojn (kaj recenzojn), kiuj estos atente studataj post la elĉerpiĝo de la unua eldono, kaj ni bonvenigas pliajn komentojn. Ni tamen sugestas, ke antaŭ la sendo de la propono, vi atente legu la liston (nia brazilana samideano ne rimarkis, ekzemple, ke Geraldo Mattos jam estas en NDK), kaj samtempe kun la propono sendu ankaŭ “malproponon”, do skribu la nomojn de personoj, anstataŭ kiuj viaj kandidatoj devis aperi en nia 200-persona listo.

Halina Gorecka

Aleksander Korĵenkov

Nova retejo por lerni la polan lingvon

EU-projekto enkadre de la programo Erasmus+ kun la nomo “Polish Online” estas realigata pere de internacia teamo, en kiu partoprenas ankaŭ E@I. La projekto baze eliras de la spertoj de kreado de similaj retejoj, kiuj baziĝis en la kreo de poresperanta paĝaro lernu.net. La sperton kaj scielon (angle know-how) de konstruado de lernu.net eluzas nun esperantistoj el la firmao Studio Gaus kaj organizo E@I por kreadi diversajn lingvolernigajn retejojn.

La pola enrete

En 2019 ekfunkcios la paĝaro www.polski.info, kie oni povos lerni la polan en la bazaj niveloj de A1 kaj A2. La pola estas relative komplika lingvo, do des pli gravas havi kvalitan kurson ĝuste por la komencaj niveloj. Malgraŭ tio, ke la pola lingvo estas la plej granda slava lingvo ene de EU, ankaŭ por tiu ĉi lingvo mankas kvalita kaj multlingva lingvoinstrua retejo, kie oni povus facile lerni ĝin. Tion nun volas ŝanĝi tiu ĉi projekto, kiun iniciatis kaj kunrealigas esperantistoj. Daŭre estas multaj lingvoj, por kiuj ne ekzistas kvalita enreta materialo por lerni kaj/aŭ praktiki ĝin.

Lingvolernigaj sukcesoj

La teamo de Studio Gaus kaj Edukado@Interreto post la kreo de lernu.net realigis plurajn edukajn retejojn. La unua EU-subtenita retejo estis www.slovake.eu por instrui la slovakon al eksterlandanoj. Ĝi funkcias jam la sepan jaron, havas 15 lingvajn versiojn kaj pli ol 66 mil registritajn uzantojn. Sekvis www.deutsch.info, kiu jam havas 19 lingvoversiojn kaj preskaŭ duonmilionon da registritaj uzantoj. La portalo por la ĉeĥa lingvo: www.mluvtecesky.net enhavas ok lingvajn versiojn, sekve la paĝaro por la rusa lingvo www.russky.info – jam 12 versiojn.

Preskaŭ ĉiu kreita retejo ricevis altan takson aŭ premion. Ekzemple, slovake. eu estis taksita kiel “projekto de la plej bona praktiko” (best practice project) de la brusela agentejo EACAE por 2007-2013. Mluvtecesky.net iĝis “la plej bona nacia projekto” de la ĉeĥa nacia agentejo de la programo Erasmus+ en 2016. Deutsch.info ricevis premion por “la plej bona eduka retejo” en reta voĉdonado en Germanio. Ĝis nun laste kreita russky.info ricevis pritakson “projekto de la plej bona praktiko” de la slovaka nacia agentejo (kiu la projekton financis). Kiel videblas, la laboro de esperantistoj povas esti kaj kvalita kaj utila kaj aprezata de ekstere.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antaŭ 45 jaroj, la 14an de majo 1973 mortis Raymond Schwartz (1894-1909-1973), franca bankoficisto kaj esperantisto, animanto de la kabaredoj “La Verda Kato”, “La Bolanta Kaldrono” kaj “La Tri Koboldoj” en Parizo; aŭtoro de la romano “Kiel akvo de l’ rivero” (1963) kaj de aliaj verkoj legataj ankaŭ nun. La tradicia listo de ĉi-monataj jubileoj estas legebla en la sekva paĝo.

Jubileoj kaj memordatoj en majo 2018

02. Antaŭ 30 jaroj mortis **Nikolaj Faddejeviĉ Danovskij** (1905-1925-1988), rusa sovetunia inĝeniero, ĵurnalisto, kunlaboranto de enciklopedia eldonejo kaj esperantisto; vicprezidanto de TEĴA, aŭtoro de pluraj artikoloj en/pri Esperanto kaj de la monografio *Enkonduko en la arton traduki*, gvidanto de koresponda kurso por E-tradukantoj, tradukanto (i.a. de *Principidino Mary* de Lermontov), E-instruisto.

14. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Vilmos Bleier** (1903-1922-1940), juda hungaria foirvendisto, seruristo kaj esperantisto; salajrata oficisto de Hungara E-Societo Laborista (1924-30); ekde 1931 la ĉefa posedanto de *Literatura Mondo* kaj de Asocio de E-istaj Libro-Amikoj, kunredaktoro de *Enciklopedio de Esperanto*, eldoninto de pluraj gravaj E-libroj kaj aŭtoro de multaj artikoloj.

14. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **André Albault** (1923-1939-2017), franca medicinisto kaj esperantisto, prezidanto de UFE (1967-74), estrarano de UEA pri kulturo (1962-67), prezidanto de la Akademio de Esperanto (1983-95), redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* (1958-59) kaj *Monda Kulturo* (1963-66), aŭtoro de pluraj verkoj (*Dictionnaire français-Espéranto*, 1961; *Naŭ prelegoj pri la Fundamento*, 1990; *Vojaĝo tra la landoj*, 1991 k. a.), kreinto de la alfabeto NHA por Esperanto, patro de tri denaskaj esperantistoj.

14. Antaŭ 45 jaroj mortis **Raymond Schwartz** (1894-1909-1973), franca bankoficisto kaj esperantisto, animanto de la kabaredoj *La Verda Kato*, *La Bolanta Kaldrono* kaj *La Tri Koboldoj* en Parizo; aŭtoro de *Verdkata testamento* (1926), *Prozo ridetanta* (1928), *Anni kaj Montmartre* (1930), *La stranga butikoj* (1931), *La ĝoja podio* (1949), *Kiel akvo de l' rivero* (1963), *Vole ... novele* (1971), ... *kun siaspeca spico!* (1971) k. a., redaktoro de la satira gazeto *La Pirato* (1933-35).

16. Antaŭ 5 jaroj mortis **Werner Bormann** (1931-1947-2013), germana ekonomikisto, ŝtataficisto kaj esperantisto, prezidanto de GEA (1967-77), vicprezidanto (1974-77) k ĝenerala sekretario (1977-80) de UEA, direktoro de Germana E-Instituto (1967-92), prezidanto de FAME-Fondaĵo (2000-05), prezidanto de la Akademio de Esperanto (1995-98), aŭtoro de *Bona ŝanco* (1970), *La lingva problemoj en la Eŭropa Komunumaro* (1977), *Mondkomerco kaj lingvo* (1993), *Interlingvistiko – planlingvoj kaj iliaj ecoj* (2004) k. a.

23. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Chen Yuan** (1918-1931-2004), ĉina redaktoro, lingvisto, ŝtataficisto (vicprezidanto de la Ŝtata Skriblingva Reformkomisiono, vicprezidanto de Ĉina Eldonista Asocio, direktoro de la Instituto pri Aplika Lingvistiko ĉe la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro en la Ŝtata Komisiono pri Lingvaj Aferoj) kaj esperantisto, ĝenerala sekretario de ĈEL meze de la 1950aj jaroj, vicprezidanto (1980-89) k prezidanto (1989-95) de ĈEL, redaktinto de pluraj eldonaĵoj en/pri Eo, vicprezidanto de LKK kaj la ĉeforganizinto de la 71a UK en Pekino (1986), honora prezidanto de ĈEL (1995), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1986).

23. Antaŭ 60 jaroj (1958) naskiĝis la redaktoro de ĉi tiu bitgazeto.

Aleksander Korĵenkov

Bibliografio de Aleksander Korĵenkov (1)

Antaŭ kelkaj jaroj Detlev Blanke petis nin kompili, okaze de la venonta 60-jariĝo de Aleksander Korĵenkov (A. K.), bibliografion de liaj verkoj en/pri Esperanto kaj interlingvistiko por aperigo en *Informilo por Interlingvistoj*. La bibliografio devus havi jenajn fakojn:

- A. Libroj verkitaj/tradukitaj de A. K.
- B. Bitlibroj verkitaj/tradukitaj de A. K.
- C. Kontribuoj de A. K. al libroj
- Ĉ. Libroj kompilitaj/editoritaj de A. K.
- D. Kontribuoj de A. K. al gazetaro
- E. Gazetoj redaktitaj de A. K.
- F. Pri A. K.: intervjuoj, recenzoj, artikoloj (en libroj kaj gazetoj)
- G. Interretaj verkoj de A. K. (krom elektronikaj versioj de paperaj verkoj)
- Ĝ. Sonpublikaĵoj de A. K. (podkasto)
- H. Retejoj de A. K.

Dum la kompilado evidentiĝis, ke la suma nombro de la bibliografieroj proksimas al milo, kaj eble eĉ superas milon. La laboro ne estas finita, ĉar estas malfacile trovi la tekstojn, kiuj aperis antaŭ kelkaj jardekoj en gazetaro, precipe se temas pri senpermesaj represoj kaj priesperantaj artikoloj en la ruslingva gazetaro.

Tamen la verkoj aperintaj en libroj (A, B, C, Ĉ kaj parto de F) estas fintraktitaj, kaj ĉiube ni prezentas la liston, kiu konsistas el 187 bibliografieroj.

1983

A01. Gorecka H., Korĵenkov A., Peĉjonkin A. Uralaj renkontiĝoj // Du eseoj: Gorecka H., Korĵenkov A., Peĉjonkin A. Uralaj renkontiĝoj; Pri perspektivoj de la movado en Uralo: Raporto de UEK. – Tjumenio: [Urala Esperanto-Komitato], 1983. – P. 3-6.

1984

C01. Pri la aŭtoro // Birjulin A. Pri la nocio “esperantisto-aktivulo” aŭ la aktivecoj veraj kaj malveraj: Revuo de la tipoj rimarkeblaj en nia junulara movado. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1984. – P. 2.

1986

A01. Gorecka H., Korĵenkov A., Kudrjavcev V. Katalogo de esperantaj kaj interlingvistikaj libroj el Ruslando kaj Sovetio. – Sverdlovsk: KEB, 1986. – 6 p.

C01. Kvinlingva vortaro // Baza legolibro por komencantoj. – Budapeŝto: HEA, 1986. – P. 73-117. – [La rusa sekcio de la vortaro].

Ĉ01. Gazizi G. Zigzage: Poemaro. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1986. – 24 p.

1987

C01. Postparolo // Ĵurzēns N. El “Mia spektro”. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1987. – P. 29.

C02. Pri la verko kaj ĝia aŭtoro // Lozgaĉev N. La tago del eterno. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1987. – P. 43-44.

Ĉ01. Ĵurzēns N. El “Mia spektro”: Poemaro. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1987. – 30 p.

1988

C01. Характерные морфологические и словообразовательные особенности русского язычных эсперантоговорящих // Плановые языки: Итоги и перспективы. Тезисы докладов конференции

по интерлингвистике (Тарту, 22-24 октября 1987). – Тарту: Тартуский государственный университет, 1988. – С. 54-57.

C02. Pri la aŭtoro // Korotkov M. Homo, kiu mortigis. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1988. – P. 85.

Ĉ01. Zamenhof L. Nova sento: Poemaro. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1988. – 20 p.

1990

A01. Краткий эсперанто-русский словарь. – Свердловск: UES, 1990. – 8 с.

1991

A01. Gorecka H., Korĵenkov A. Katalogo de esperantaj kaj interlingvistikaj libroj el Ruslando kaj Sovetunio. – 2a eld. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1991. – 24 p.

A02. Maksimov M. Sub la gvido de la Glora Militestro: Intervjuo kun G. Kuzjmin / Trad. el la rusa. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – 8 p.

C01. Ĉeĥov A. Sveda alumeto / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 9-30.

C02. Ĉeĥov A. Ĉevala familinomo / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 65-69.

C03. Ĉeĥov A. Almozulo / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 102-107.

C04. Ĉeĥov A. Ŝi deziras dormi / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 108-114.

C05. Ĉeĥov A. Fragmento / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 118-119.

C06. Ĉeĥov A. Historio de komerca entrepreno / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 120-124.

C07. Ĉeĥov A. Grosoj / Trad. el la rusa // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 125-135.

C08. [Korĵenkov A.] Glosaro, Bibliografio, Klarigo // Ĉeĥov A. Sveda alumeto. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – P. 136-137.

C09. [Gorecka H., Korĵenkov A.] Esperanto en nia lando // Internacia esperantista renkonto Eŭropo-Azio'91. – [Sverdlovsk]: [UES], 1991. – P. 14-17 p.

Ĉ01. Ĉeĥov A. Sveda alumeto: Novelaro. – Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. – 140 p.

Ĉ02. Internacia esperantista renkonto Eŭropo-Azio'91: Memrorlibro. – [Sverdlovsk]: [UES], 1991. – 24 p.

1992

A01. Stalin I. Marksismo kaj lingvoscienco: Lingvistikaj eseoj / Trad. el la rusa. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. – 44 p.

C01. Karaj samlandanoj, estimataj gastoj! // Eŭropo-Azio'92. – Jekaterinburg: REA, 1992. – P. 1.

C02. [Gorecka H., Korĵenkov A.] Esperanto en nia lando // Eŭropo-Azio'92. – Jekaterinburg: REA, 1992. – P. 13-16.

C03. Anstataŭ la prefaco // Sapoĥnikov V. Ljusjka Benc. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. – P. 3.

C04. Drezen E.-W. En batalo por SEU / Trad. el la rusa // Drezen E.-W. Historiaj studoj. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. – P. 151-162.

C05. Postparolo // Varankin V. Metropoliteno. – 3a eld. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1982. – P. 251-256.

C06. Komentario // Varankin V. Metropoliteno. – 3a eld. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1982. – P. 257-261.

Ĉ01. Drezen E.-W. Historiaj studoj. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. – 167 p.

Ĉ02. Eŭropo-Azio '92: Memrorlibro / Komp. H. Gorecka, A. Korĵenkov. – Jekaterinburg: REA, 1992. – 18 p.

Ĉ03. Sapoĵnikov V. Ljusjka Benc: Satiro kaj humuro. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. – 80 p.

1993

A01. Turgenev I. La unua amo / Trad. el la rusa A. Korĵenkov, V. Kudrjavcev, I. Novikova. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. – 72 p.

C01. Enkonduko // Dostojevskij F. Krime kaj puno. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. – P. 5-6.

C02. Komentario: Pri la aŭtoro; Pri la lingvaĵo de la romano; Notoj // Dostojevskij F. Krime kaj puno. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. – P. 465-486.

C03. Komentario // Puŝkin A. Neĝa blovado. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. – P. 14-16.

C04. [Korĵenkov A.] Enkonduko // Turgenev I. La unua amo. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. – P. 3.

1994

C01. La eldonintoj. Antaŭparolo // Zamenhof L. Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia. – Reeld. – Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto; Sezonoj, 1994. – P. 3-4.

1995

C01. Enkonduko // Tolkien J. R. R. La Kunularo de l' Ringo: La unua parto de La Mastro de l' Ringo. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. – P. 5-10.

C02. La eldonintoj. Antaŭparolo // Zamenhof L. Kongresaj paroladoj. – Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1995. – P. 3-4.

Ĉ01. Zamenhof L. Kongresaj paroladoj. – Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1995. – 64 p.

1996

C01. Antaŭparolo // Lermontov M. Principino Mary. – Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996. – P. 3-4.

C02. [Korĵenkov A.] Komentario // Lermontov M. Principino Mary. – Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996. – P. 70-71.

Ĉ01. Ĉaldajev V., Gazizi G., Kris A., Lozgaĉev N. Kvarteto: Originalaj poemoj / Komp. A. Korĵenkov, N. Lozgaĉev. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1996. – 80 p.

1997

A01. Краткая грамматика эсперанто. – Екатеринбург: Ruslanda Esperantisto, 1997. – 16 с.

A02. Эсперанто-русский словарь: ок. 2000 слов. – Екатеринбург: Ruslanda Esperantisto, 1997. – 32 с.

C01. [Korĵenkov A.] Esperanto post la jaro 2000 // Eŭropo-Azio '97. – Jekaterinburg: UES, 1997. – P. 11.

C02. Enkonduko // Tolkien J. R. R. La Kunularo de l' Ringo: La unua parto de La Mastro de l' Ringo. – 2a eld. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. – P. 5-10.

C03. Antaŭparolo // Tolstoj L. La morto de Ivan Iljiĉ. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. – P. 3-4.

C04. Komentario // Tolstoj L. La morto de Ivan Iljiĉ. – Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. – P. 53.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La plej grava ĉi-printempa kultura evento en Esperantujo estas, sen ajna dubo, la apero de la longe atendita muzika albumo “La Kompanoj kantas Brel en Esperanto”.



Halina Gorecka rakontas pri NDK (Foto: Taesok Choe)

Sukcesa prezentado de NDK en Vilno

La 12an de aprilo en la Litovia Ĵurnalista Domo en Vilno okazis prezento de la nova verko *Nia diligenta kolegaro* (NDK) de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Ĉi tiu libro en enciklopedia formo prezentas detalajn kaj elĉerpajn biografiojn de ducent eminentaj esperantistoj en la tuta mondo ekde la apero de Esperanto ĝis nun. NDK sendube estas elstara monumento al multaj diverslandaj fervoraj samideanoj, kiuj dediĉis siajn vivojn al nia komuna afero.

La libron kuneldonis la Kaliningrada eldonejo *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio. La preparadon de la libro (sed ne la eldonadon) subvenciis Esperantic Studies Foundation kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. La librokovrilon kreis la litova pentristo Karolis Zovė. NDK estas la sesa libro komune eldonita de *Sezonoj* kaj LEA.

Al la prezentado venis 34 esperantistoj – ĉefe de Vilno, sed ankaŭ el Kaŭno, Ŝiauliai, Panevėžys kaj Berlino. Por prezenti la libron el Kaliningrado venis ĝiaj aŭtoroj Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

La prezidanto de LEA Povilas Jegorovas per mallonga enkonduko prezentis la libron, substrekante ĝian enciklopedian koncizecon kaj fidindecon, kaj la aŭtorojn, kiuj dum unu jardeko intense laboris pri ĉi tiu projekto. Kaj la grandioza rezulto de ilia laborado meritas atenton de ĉiu konscia esperantisto.

Halina Gorecka rakontis pri la ekesto kaj evoluo de la ideo pri NDK, informis pri la multjara kaj skrupula kolektado kaj kontrolado de malfacile troveblaj informoj pri la famuloj de Esperantujo, fine pri tiuj, kiuj volontule helpis en la informserĉado, kontrolado kaj provlegado. Aleksander Korĵenkov rakontis pri la laŭseksa, laŭaĝa kaj laŭlanda statistikoj pri NDK kaj prezentis kelkajn interesaĵojn kiuj malkovriĝis dum la esplorado kaj verkado de la biografioj.

Poste la aŭtoroj longe respondadis al la multaj demandoj. Intertempe, la Berlina Esperanto-aktivulo Johano Pachter rakontis pri kelkaj libroj eldonitaj en Germanio. La ĉeestantoj povis aĉeti la novan libron kaj ricevi dediĉojn de la aŭtoroj. Malgraŭ la konsiderinda prezo, estis venditaj 13 ekzempleroj de la libro; ĉi tiu aĉetemo superis la esperojn de la kuneldonintoj, kiuj kunprenis malpli multajn ekzemplerojn ol estis bezonate kaj sekvatage devis sendi kelkajn librojn poŝte al la aĉetintoj.

Post la fermo de la “oficiala parto” longe daŭris neformalaj konversacioj, diskutoj kaj babiloj ĉe bufedaj manĝaĵoj kaj vino.

Pri la nova enciklopedio, presita antaŭ du monatoj en Kaŭno, informis pluraj amaskomunikiloj de Litovio, interalie: la nacia novaĵagentejo ELTA, tutlanda tag-ĵurnalo *Lietuvos aidas*, sciencista gazeto *Mokslo Lietuva*, novaĵretejo de Litovia Ĵurnalista Asocio kaj aliaj novaĵretejoj.

Povilas Jegorovas

István Ertl en Litovio

Komence de aprilo en Vilno gastis István Ertl – tradukisto de la Eŭropa Revizora Kortumo (Luksemburgio), konata movada intelektulo, redaktinto de kelkaj Esperanto-revuoj, poligloto, tradukanto, verkisto, literatura kritikisto, unu el redaktoroj de *Beletra almanako*. Li venis al Litovio kun siaj gefiloj Dorián kaj Klára.

La 5an de aprilo Litova Esperanto-Asocio okazigis renkontiĝon de István Ertl kun esperantistoj. Al la renkontiĝo en la Nacia Biblioteko de Litovio venis 24 esperantistoj. La gasto tre interese rakontis pri problemoj de tradukado kaj interpretado ĝenerale kaj speciale pri sia sperto de la tradukado al Esperanto de la poemaro *La unufoja lando* de Tomas Venclova. Ĉi tiu poemaro estis eldonita dulingve (litove kaj Esperante) en Kaŭno en 2005 antaŭ la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. Preskaŭ ĉiujn poemojn el ĉi tiu kolekto tradukis al Esperanto István Ertl.

La gasto respondis demandojn de la kunvenintoj, multaj el kiuj uzis la eblon akiri la poemaron *La unufoja lando* kaj ricevi aŭtografon de la tradukinto. Ankaŭ eblis aĉeti kelkajn numerojn de *Beletra almanako*. La saman tagon István Ertl kaj Povilas Jegorovas vizitis la prezidanton de la ŝtata komisiono pri la litova lingvo, esperantiston Audrys Antanaitis en ties oficejo.

La gastoj, sub la gvido de Glebo Malcev, ekskursis tra Kaŭno kaj kune kun Taesok Choe vizitis la urbon Trakai.

Povilas Jegorovas

Tri mondaj premieroj samtempe

La 7an de aprilo 2018 en la plenplena Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago estis premiere prezentita la nova opero de Ivan Acher *La suferado de princo Sternenhoch*, komponita laŭ la groteska romano de la ĉeĥa filozofo kaj verkisto Ladislav Klíma (1878-1928). La tuta opero estis kantita en Esperanto. La reĝisoro estas Michal Dočekal.

Miroslav Malovec, kiu tradukis la tekston al Esperanto, klarigis, ke Acher deziris, ke la opero estu kantata en Esperanto, por ke la spektantoj aŭskultu la melodion kaj ne klopodu deĉifri vortojn. Li sendadis unuopajn scenojn al la tradukanto, kiu esperantigis la deziratajn frazojn, kaj nur poste ili estis muzikigitaj. Ivan Acher jam komponis muzikon por kelkaj filmoj kaj teatraĵoj, sed *Sternenhoch* estis lia opera debuto. Poste la teatro ripetos la operon ĉiumonate en sia programo.

La ĉeĥaj esperantistoj povas fieri, ĉar temas ne pri unu, sed pri tri premieroj: unue, la monda premiero de nova opero; due, la monda premiero de nova opero en Esperanto; trie, la monda premiero de opero en Esperanto en la Nacia Teatro de Prago!

Legu pliajn informojn pri la opero:

<http://novajhoj.weebly.com/sternenhoch-opero.html>

Paŭlo Pavliček



Ankoraŭ unu libro pri Eroŝenko

Новикова, Татьяна; Захарова, Татьяна. *Знаменитые земляки. Ерошенко*. – Рыбинск: МедиаРост, 2018. – 48 с., ил. – (Библиотека Белгородской семьи)

La libroserio “Библиотека де Белгорода familio” en populara stilo rakontas pri kultura-historia kaj natura diverseco de la Belgoroda regiono, situanta en la sud-okcidenta parto de Ruslando ĉe la limo kun Ukrainio. Kadre de ĉi tiu libroserio estas lanĉita la scienc-populara serio “Famaj samregionanoj”, kiu rakontas pri homoj, kiuj naskiĝis, vivis, kreis aŭ agis en Belgoroda regiono: ŝtataj kaj armeaj agantoj, verkistoj, sciencistoj, pentristoj, muzikistoj k. a.

La libroj estas destinitaj por familia legado, por loĝantoj de la regiono kaj turistoj. Entute en la serio jam aperis dudek biografioj de famuloj, en kies kreado partoprenis laborantoj de arkivoj, kulturaj kaj edukaj instancoj; estis uzitaj unikaj arkivaj materialoj, fotoj kaj ilustraĵoj. La aŭtoroj celis per simpla kaj komprenebla lingvaĵo rakonti ne pri datoj kaj faktoj, sed pri la sortoj de siaj herooj.

En ĉi tiu kulture grava serio estas eldonita ankaŭ libro pri la verkisto, vojaĝanto,



instruisto kaj esperantisto Vasilij Eroŝenko (la pli ĝusta nomformo estas Jeroŝenko). La vivo de Eroŝenko estas prezentata kronologie ekde la infanaĝo tra lerneaj jaroj en Moskvo, vojaĝado en Eŭropo kaj Azio, reveno al la patrujo kun laboro en diversaj landopartoj ĝis la vivofino en Obuĥovka, apud Starij Oskol, Belgoroda regiono, kie nun funkcias muzeo dediĉita al Vasilij Eroŝenko.

Apero de biografio de esperantisto en la populara libroserio estas grava evento, ĉar la librojn de la serio (eldonkvanto de ĉiu unuopa titolo estas 5 mil 500 ekzempleroj) ricevas ĉiuj bibliotekoj kaj lernejoj de la regiono. Esperanto ricevas adekvatan prezenton en la libro, unu el kies ĉapitroj titoliĝas “En la lingvo de la tutmonda paco kaj amikeco”, kiun akompanas foto de Kalocsay, bildkartoj pri la Universalaj Kongresoj en Helsinko kaj Nurenbergo. La prezento de Esperanto aperas en alia ĉapitro, ĝin garnas portreto de Zamenhof, foto de Anna Ŝarapova, kiu rakontis al Vasilij pri Esperanto. Kompreneble, la rolo de Esperanto estas emfazita en la priskribo de la eksterlandaj vojaĝoj de Eroŝenko.

Kvankam en la libro estas prezentataj faktoj el la vivo de Eroŝenko, jam konataj de la esperantistoj, ĝi meritas lokon sur Esperanto-bretaroj: la libro estas tre riĉe ilustrita, ĝi eĉ aspektas alumece: formato 170×195 mm, nekutime luksa, dika, glacea papero, fortika bindo. Oni trovas fotojn ne nur de Eroŝenko mem, sed ankaŭ fotojn kaj reproduktaĵojn, kiuj montras lokojn, kie li vivis en diversaj periodoj. La rakontostilo estas flua kaj atentokapta, la vivosorto kaj foje danĝeraj aventuroj de Eroŝenko katenas intereson de la unufoja leganto ĝis la librofino.

Enestas informoj pri libroforme eldonitaj verkoj de la blinda verkisto, pri dokumentaj filmoj dediĉitaj al li. Okaze de la 125-jara jubileo de Eroŝenko estis kreitaj tri dokumentaj filmoj.

Jen laŭdinda iniciato prezenti al la ruslingva legantaro biografion de la eksterordinara blinda talentulo, kiu danke al Esperanto vidis la mondon!

Halina Gorecka



ЕРОШЕНКО

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Ĉi-numere finfine revenas nia kuirarta rubriko. Post la prezento de la Kenigsbergaj klopsoj, litovaj cepelinoj kaj pola bigoso venas la vico de barĉo, kiu estas fieraĵo de la belarusa, rusa kaj ukraina popoloj kun multegaj variaĵoj, kaj ĉiu kuirist(in)o havas sian propran recepton de ĉi tiu kulta orient-eŭropa plado, ankaŭ la eldonanto de ĉi tiu gazeto, Halina Gorecka.

Barĉo, mirindaĵo de Orienta Eŭropo

- Ĉu vi manĝos hieraŭan barĉon?
- Jes!
- Venu morgaŭ.

Kvankam anekdoto, por barĉo ĝi pravas. En la dua kaj tria tagoj barĉo estas plej bongusta kun intensa gusto. La samo validas por alia multingredienca supo – soljanko.

Plonĝo en la historion

La historio de barĉo (belaruse: боршч, pole: barszcz, ruse kaj ukraine: борщ) plenas je enigmoj kaj malkovroj. Plurjarcenta diskuto de Ruslando kaj Ukrainio pri la aŭtoraj rajtoj estas nur epizodo. Barĉo ja estas kultura fenomeno. Diskutoj pri tio, kies ĝi estas – ukraina, rusa, belarusa aŭ pola – neniam ĉesos. Ĝenerale, barĉo estas unu el la plej konataj slavaj supoj, kaj ukraina barĉo iĝis vera komerca marko, kvankam ankaŭ ekzistas malnovlitova, pola, moskva kaj multaj aliaj.

“Estante vaste konata en la mondo, ĉi tiu plado samtempe estas fenomeno de tre specifa, precipe nacia kulturo. Ĉi tiu karakterizo de barĉo ebligas sekvi, kiel homoj transportis ĝin el unu loko al alia, adaptis al novaj historiaj kondiĉoj, kaj transdonis al aliaj kulturoj”, – diras moderna esploristo de barĉo Nikolaj Burlakov, rusdevena usonano (Burlakoff N. *The world of Russian Borsch*. NY, 2013. P. 5).

Ĉe la vorto “barĉo” oni kutime imagas apetitivekan teleron, plenan de varma densa supo kun specifa beta koloro. Rememoru la priskribon de Bulgakov en *La Majstro kaj Margarita*: “... Pelagia Antonovna enportis vaporantan kaserolon, jam unua rigardo sur kiun ne lasis eĉ malplejan dubon, ke tie en la denso de la broga barĉo kuŝas tio, ol kio plibongusta estas nenio en la mondo – medola ostoj” (Trad. el la rusa Sergio Pokrovskij).

Tiun aspekton barĉo akiris dum la du lastaj jarcentoj. Antaŭe barĉo estis nur termino, en kiun ĉiu popolo metis sian komprenon. En la historia teritorio de Ukrainio barĉo ne imageblas sen beto. En la Centra Ruslando ĝi pli similas al acideta plado, kiun oni gustigis per fermentitaj folioj de herakleo kaj brasiko. Pola blanka barĉo ne estas imagebla sen faruno, fumigita kolbaso kaj kreno.

Necesas diri, ke recepto de barĉo estas tre konvencia nocio. De la pratempoj ne ekzistis unueca recepto, kiel oni diras per la moderna lingvaĵo – recepto de barĉo estas malfermita kodo. Ĉiu mastrino kuiras ĝin konforme al sia gusto, pli ĝuste – konforme al la gusto de siaj familianoj.

Sekretoj de bona barĉo

Por sukcesi en kuirado de barĉo oni devas koni kelkajn sekretojn.

Sekreto unua. Kutime barĉo estas kuirata el buljono vianda, osta aŭ miksita

vianda-osta. Ĝuste preparita buljono estas bazo de bona barĉo. Plej ofte oni uzas brustaĵon, malpli ofte – al- aŭ antaŭ-ripaĵon. Uzatas bova, porka, miksitaj viando, ankaŭ eblas uzi por barĉo kokan aŭ anseran buljonon (Poltava kaj Odesa barĉoj). Kompreneble, ekzistas ankaŭ vegetara barĉo. Por la fastaj kaj vegetaraj barĉoj oni povas aldoni fazeolojn anticipe kuiritajn.

Sekreto dua. Preparado de legomoj estas aparta. Precipe gravas ĝustamane pretigado de betoj. Estas kelkaj manieroj: kuirado, stufado, bakado. Betojn oni pretigas nepre aparte, por konservado de bela koloro aldonu vinagron aŭ citronosukon, por intensigi la koloron aldonu kuleron da sukero. Cepoj, karotoj kaj petroselo (radiko) dum la stufetado devas esti kovritaj per graso (butero aŭ ŝmalco).

Sekreto tria. Acidetan guston al barĉo oni donas per anticipe “acidetigita” beto (vd. supre), per iom da suko de fermentita brasiko aŭ iom da oksikokoj, aŭ ĉerizoj. Gravaj konservi ekvilibron inter dolĉo (tiun donas beto) kaj acido.

Sekreto kvara. Saturon kaj densan de barĉo oni povas pliigi per aldono de terpomoj aŭ tranĉaĵoj de pomo.

Sekreto kvina. Specialan rolon ludas verdaĵo, kiun oni surtabligas haketita. Same bonas acidkremo kaj ajlo.

Kiel servi barĉon

Tradicie oni servas por barĉo “pampuŝkojn” – bulketojn kun saŭco preparita el ajlo, salo, verdaĵo kaj oleo kun aldono da akvo por pli likva konsisto. Tiel oni faras en la tradiciistaj rusaj kaj ukrainaj restoracioj tra la tuta mondo. Aldonendas al telero kun barĉo acidkremo.

En Kaliningrado funkcias restoracio *Barĉo kaj lardo*, kiun ni rekomendas al gastoj de la urbo. Krom barĉo kun pampuŝkoj kaj lardo oni nepre gustumu krenbrandon, kvankam ĝia postgusto eble persekutos vin eĉ en la sekva tago.



Kio estas bezonata por fari barĉon?

Ne forgesu, ke ĉiu kuiristo, ĉiu mastrino havas sian propran recepton de barĉo. Kuiru, eksperimentu, serĉu sian propran recepton. Kaj fine, la baza recepto de barĉo, kiun mi uzas, kaj kiun entuziasme aprobas la redaktoro de ĉi tiu gazeto.

Ingrediencoj:

2 litroj da akvo;

500 g da viando;

$\frac{1}{4}$ da brasikkapo;

4 terpomoj;

1 granda ruĝa beto (aŭ du mezgrandaj);

25 g da porka lardo;

25 g da butero;

0,5 glaso da tomatosaŭco aŭ 2 tomatoj;

1 karoto;

1 petrosela radiko;

2 cepoj;

1 supkulero da vinagro 3%;

2 tekuleroj da sukero;

3 laŭrofolioj;

4-5 ajlobulberoj;

5-6 piprogramoj;

1 supkulero da petroselfolioj;

0,5 glaso da acidkremo.

Laŭpaŝa preparado:

1. Preparu buljonon el viando. Elmetu la viandon el la preta buljono, post malvarmiĝo dividu la viandon je pecoj.

2. Stufetigu beton tranĉitan pajlere kun parto da butero, aldoninte vinagron kaj sukeron.

3. Tranĉu pajlere karoton kaj petroselan radikon, tranĉu kubete cepojn. Fritu ilin en butero aldoninte tomatosaŭcon aŭ senŝeligitajn kaj distranĉitajn tomatojn.

4. Tranĉitajn je ŝtipetoj aŭ kubetoj terpomojn metu en la bolantan buljonon, post kiam la buljono ekbolos aldonu raspitan brasikon kaj kuiru dum 10-15 minutoj. Aldonu la stufitajn legomojn, laŭrajn foliojn, piprogramojn kaj kuiru barĉon ĝis la pretiĝo.

5. Antaŭ la finpretiĝo oni povas aldoni haketitajn foliojn de petroselo kaj ajlon premfrotitan kun lardo.

6. Atendu almenaŭ 30 minutojn antaŭ ol verŝi barĉon en telerojn. Acidkremon aldonu en telerojn laŭplaĉe. Manĝu barĉon kun sekala pano aŭ kun tritikaj bulketoj frotitaj per ajlo (pampuŝkoj estas festa manĝeto).

Bonan apetiton!

Halina Gorecka

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kien eĉ birdo ne fulgas

... ĉe la stacio Chongnyangni Justa atendis mian alvenon de Andon, kaj post duhora agrabla babilado ŝi akompanis min eĉ ĝis la fulghaveno Incheon. (Raporto de Sano Hisato, 2012.01.03, http://cafe.daum.net/_c21_/bbs_search_read?grpId=Af&fId=1l6&danum=1815&docId=Af%7C1l6%7C1815%7C20120103205532&q=KONIS&_referer=-V7kfJwkeLEGMZxGlqgZEmQpRi_dl-y1h)

Monumenta manko

Ekzempla statuo de landa asocio en Esperanto (<https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/11537>, 8 mar 2018; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Kanisa kliento bona por komerco?

Kiam iu hundo vagadas malsata surstrate kaj vi ofertas al ĝi nutraĵon... ĝi rapide prenos la manĝon... (Zlatko Tisljar: *Eseo: Identecoj // Eŭropa Bulteno*, 2018, N^o3, p. 7)

Varia vetarmado

Ĝuste tiun temon tuŝas la ĉefartikoloj en la nuna numero... ĝi estas polemika kaj iom tabua. Alice Andrès el Francio klarigas... ke ekzistas pluraj tipoj de pluarmemaj rilatoj. (Rogener Pavinski: *Redakcie // Kontakto*, 2018, N^o1, p. 3)

Tamen ne eskapis eraron

Eduardo Berdor kaj Toño del Barrio provlegis la tuton, malkovrante novajn aferetojn, kiujn eskapis al niaj mallertaj okuloj. (Postparolo de "Xavi kaj Kani" al "Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto", Parizo: SAT-EFK, 2018, p. 374)

Revuo el la ĉielo

Hodiaŭ, unu monaton post la disendo de la julia "Ondo" ĉi tiu artikolo iĝis legebla en la novaĵretejo La Balta Ondo. (*Nia Trezoro: Edmond Privat*, 2015-07-23, <http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/Members/AIKo/nia-trezoro-edmond-privat>)

Staras kiel muro kaj turo

Sed la fakliterturo komencas ekzisti kaj grandiĝi... (2012-06-14, komento de „esperanto” al <http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2012/tutmonda-ker-ekzamen-o-okazis-en-17-landoj>)

Kaj jen – la Bub’ englitis!

Ian, ĉu tiuj gardantoj defendas Vin kaj Renaton kontraŭ eventualaj eleksteraj atakantoj, aŭ ĉu tiuj gardantoj defendas eksteran publikon, por ke Vi kaj Renato ne ĝenu la eksteran publikon per viaj prelegoj? (Vladimir Minin, listo uea-membroj, 18 mar 2018, rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnický@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 69-paĝa maja *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>